



ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO de ESPERANTO - LIGO en ISRAELO

P. K. 39004

Tel-Avivo - 61390

N-ro 73, septembro 1980



האספרנטיסט הישראלי


בטאון הליגה לאספרנטו בישראל

ת.ד. 39004, תל-אביב

מס' 73 - ספטמבר 1980

ENHAVO

La korespondado Zamenhof - Phillips	B. Golden	1.
Kongreseroj- 1980	J. Šemer	4.
La lanco kaj la kudrilo	J. Hecht	8.
Brazilio - Recepto kiel krei ĉefurbon		9.
Esperanto nepre venkos		11.
Io pri "Ĥasidoj" kaj ties kontraŭuloj	J. Kohen-Cedek	12.
Kelkaj informoj pri la nova kongreslando	H. Mašler	14.
Recenzo: Skizoj, de P. Altenberg	A. Manor	16.
Fruktoj de suspektado	E. Kišon (trad. G. Ziegler)	17.
Praktika vortaro por ĉiu tago	J. S.	18.
<u>ANGULO DE JELI</u>		
Seminario de TEJO	A. V.	19.
Antaŭ kongres'	D. Mager	19.
El nia Movado kaj agado		20.



ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO de ESPERANTO - LIGO

en ISRAELO (ELI)

P.K. 39004, Tel Avivo

N-ro 73, septembro 1980

Ĉefredaktoro -

Aleksander Manor

Redaktoro -

Josef Šemer

LA KORESPONDADO ZAMENHOF - PHILLIPS

Bernard Golden

En Israela Esperantisto (1980, n-ro 70) estis publikigita informo pri nove trovita letero de d-ro Zamenhof kaj samnumere aperis mia biografia skizo pri Henry Phillips, Jr., la unua esperantisto en Ameriko. En tiu ĉi artikolo, mi deziras kunligi ambaŭ temojn, ankoraŭ unu ĝis nun nekonsideritan leteron de Zamenhof, kaj Henry Phillips, Jr.

En oktobro 1887 Henry Phillips, sekretario de la Amerika Filozofia Societo (AFS) en Filadelfio, Usono, kune kun du kolegoj, organizis komitaton por esplori la internacilingvan demandon: "Ĉu lingvo internacia estas necesa, ĉu ĝi estas kreebla, kaj kiel ĝi devas esti" laŭ la vortoj de Zamenhof en la aldono al la "Dua Libro".

En januaro 1888 la unua raporto de la komitato estis preta; sekvis suplementa raporto, kaj ambaŭ estis publicitaj en februaro. La tria parto de la raporto konsistis el detala analizo de Volapuko, en kiu la komitato trovis "ion por laŭdi kaj multon por kondamni".

D-ro Zamenhof ricevis ekzempleron de la raporto pri Volapuko. En la arkivejo de AFS estas letero, kiun Zamenhof sendis al Henry Phillips. Tiu ĉi letero, tamen, ne estas la originalo skribita de Zamenhof, sed angla tradukaĵo sur unu flanko de leterpapero de AFS. Mankas indiko pri la lingvo, kiun Zamenhof uzis por korespondi kun Phillips, sed mi konjektas, ke ĝi estis franca, ĉar jam en januaro 1988 AFS ricevis ekzempleron de la franca versio de la "Unua Libro". Komparo de la skribmaniero de la tradukita zamenhova letero kun leteroj skribitaj de Phillips indikas, ke tiu ĉi mem faris tradukon. Jen mia esperantigo de la angla teksto.

"Varsovio, la 10-an de aprilo 1888

Estimata Sinjoro

Akceptu mian plej profundan dankon pro la raporto pri "Volapük", laŭ kiu mi vidas kun plezuro, ke AFS deziras kunvoki Internacian Kongreson por decidi la demandon pri Internacia Lingvo. Ripetante, kion mi jam diris en aliaj lokoj, mi antaŭe donas mian plenan konsenton al io ajn, kion la Kongreso decidus. Mi sendos al la Kongreso mian propran personan juĝon rilate la ŝanĝojn, kiujn oni proponas fari en la Internacia Lingvo: sed se la Kongreso radikale ŝanĝus la konstruon de la lingvo - tamen iu ajn fina formo, kiun decidus la Kongreso estos sankta kaj deviga por mi.

Zamenhof"

Nun estiĝas la demando: ĉu tiu ĉi letero estas la sola, kiun Zamenhof sendis al Henry Phillips? Se ne, kie estas la ceteraj? Kiam la komitato de AFS komencis okupi sin pri la elekto de internacia lingvo, Zamenhof, informiĝinte pri tio, sendis al la societo la francan tradukon de la "Unua Libro", eldonitan en novembro 1887. Ĉu li adresis ĝin al sekretario kaj komitatano Phillips, ĉu ankaŭ letero akompanis la libron? Estas preskaŭ certe, ke Zamenhof petis pluajn informojn pri la agado de la komitato. Per la letero citita ĉi-supre Zamenhof konfirmis la ricevon de la raporto pri Volapuko. Poste la interŝanĝo de leteroj kun Phillips sendube fariĝis pli ofta, ĉar tiu entreprenis traduki la "Unua Libro" en la anglan kaj verki anglan-esperantan vortaron. En letero, kiun Zamenhof skribis al Alfred Michaux, la franca aktivulo, en februaro 1905,

tiu mencias, ke li donis monon por la eldono de la verko de Phillips. Ĝi aperis kiel publikaĵo n-ro 22 en "Nomaro de la verkoj pri lingvo internacia Esperanto".

Estas ankoraŭ unu donitaĵo, kiu inklinigas onin supozi, ke okazis inter Phillips kaj Zamenhof pli ofta korespondado. En letero sendita en majo 1889 al Vladimir Majnov, rusa ĵurnalisto, Zamenhof informas lin pri la adreso de Phillips, ne kiel funkciulo ĉe la sidejo de AFS, sed pli persone ĉe lia propra loĝejo aŭ oficejo.

Ĝis nun spuroj de tiu korespondado ne montris sin. Neniu letero de aŭ al Phillips estas registrita en la leterkolektoj de Dietterle (Originala Verkaro, 1929), Waringhien (Leteroj de Zamenhof, 1948), Iam Kompletigita Plena Verkaro, (1973-1979), kaj Holzhaus, (Zamenhof Leteroj, 1975). Pli vasta esplorado en Filadelfio eble portos al taglumo ankoraŭ nekonatajn dokumentojn pri la lulilaj jaroj de Esperanto en Ameriko. Se ie estas konservitaj la privataj paperoj de Henry Phillips, Jr., estas eble, ke inter ili troviĝas korespondaĵoj de Zamenhof kaj ankaŭ aliaj manuskriptoj, ekzemple la plena angla-Esperanta vortaro de Phillips. Zamenhof skribas en letero sendita al Majnov en majo 1889, ke Phillips "eldonis anglan gramatikon de nia lingvo kaj nun laboras super kompilado de plena angla-esperanta vortaro." Estas apenaŭ kredeble, ke Phillips ne korespondis kun Zamenhof dum la daŭro de tiu leksikografia laboro.

Ankoraŭ unu citaĵo bezonas pluan klarigon kaj identigon. En la Aldono al la "Dua Libro", Zamenhof citas la favoran opinion de Phillips pri Esperanto kaj mencias kvar proponitajn ŝanĝojn, sed ne estas iu indiko pri la fonto de tiu citaĵo. Phillips povis verki tiun tekston en 1888 nur inter januaro, kiam li akiris la "Unua Libro", kaj junio, kiam Zamenhof ricevis permeson de la rusa cenzuro eldoni sian verkon. La citaĵo ne venas de raporto de la komitato, do estas probable, ke Phillips verkis artikolon kaj sendis kopion al Zamenhof. Kiam? Kaj ĉu Zamenhof korespondis kun Phillips pri la proponitaj ŝanĝoj?

Dum esperantologoj spekulativas pri kvar ŝanĝoj en Esperanto proponitaj de Henry Phillips, mi komencis sekvi spuron, kiu eble kondukos min al la periodaĵo, en kiu aperis la aludita artikolo de la sekretario de AFS.

KONGRESEROJ - 1980IJK - RAUMA

La Internacian Junularan Kongreson de Esperanto, okazintan en julio en la urbo Rauma, suda Finnlando, partoprenis: pli ol 300 gejunuloj el 30 landoj. Nian landon reprezentis 1 fraŭlino + 7 virsamideanoj.

Vera egaleco!

La vetero dum la kongreso en Rauma estis surprize tre (eĉ tro) varma. La manteloj, sveteroj kaj ombreloj, kiujn ni kunportis al Finnlando (malvarmvetera lando, laŭ onidiroj), restis envalizigitaj. Sed ĉar bedaŭrinde la ĉambroj en la kongresejo ne estis klimatizitaj ni ĉiuj "ŝvitsaŭnis" dum la prelegoj, kunvenoj, baloj ktp. Ĉu vi imagas al vi kongreson en la lando de la Finnoj sen saŭno?

(Sprita kongresano deklaris, ke li preskaŭ malsaniĝis je "RAŬMATISMO"...)

Vera tradicia finna (kaj kontraŭpaga) saŭnado okazis en la vespero dum la IJK. Malgraŭ anticipaj sciigoj, viroj kaj inoj saŭnis aparte...

Partoprenis la kongreson ankaŭ multaj sudfinnaj kuloj (moskitoj), kiuj evidente bone ĝuis ĝin pro la varieco de la raso kaj devenoj de la ordinaraĵoj (homaj) partoprenantoj. Iu eĉ diris, ke pro ili eblas titoli tiun ĉi kongreson kiel "troPIKA", "KULinara" kaj eĉ "KULTura".

Rilate kulinaraĵajn aferojn, la manĝoj en Rauma estis tre riĉaj. Ĉefe impresis nin la grandaj laktujoj, kiuj staris en la komuna manĝejo kaj el kies kranoj ĉiu povis libere preni lakton. Do, lakto fluis tie kiel akvo....

Dum la tradicia Internacia Vespero la israela delegacio kantis israelajn kantojn hebree kaj en esperanto kaj sukcesis ankaŭ kantigi la kongresanaron. Poste ni regalas la homojn per israelaj orientaj manĝaĵoj - "Falafel" kaj "Ĥumus", kiujn ni kunportis al eksterlando kaj kiujn lerte kuiris s-ano Mordeĥaj Braĥa en la loka kuirejo.



Kompatindaj inter la Israelanoj estis Amri Vandel kaj la subskribinto de tiuj ĉi linioj, kiuj devis ĉeesti la kunsidojn de la Komitato de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo), okazintaj en kadro de la Junulara Kongreso. Ĉi-jare la komitatanoj pasigis 30 (!) horojn dum la kongresa semajno pritraktante diversajn temojn kaj levante la manon kelkajn dekojn da fojoj por voĉdoni "jes" aŭ "ne" aŭ "sindetene".

Tri el tiuj kunsidoj finiĝis post noktmezo: unu el ili - je la horo 00.45; la du aliaj (finnfine) - je 02.00.


Paŝante el la kunsidejo direkte al la dormejo je la horo 02.00, vi povis jam rimarki la eklumon de la aŭroro. Ĝi ŝajnas nekredeble, sed en Rauma vesperiĝis en julio ĉirkaŭ la horo 22.45 kaj je 02.00 jam leviĝis la suno. La demando kiun ni ankoraŭ ne solvis restas: ĉu la loĝantoj de tiu norda mondangulo povas esti same romantikemaj dum somero, kiel la plisudaj teranoj, malgraŭ siaj mallongaj noktoj?

La sola araba kongresano estis junulo el Libano, kiu loĝas portempe en Hungario kaŭze de studoj. Estis tre interese aŭdi lin ofte krokodili en flua hungara lingvo kun la "veraj" hungaraj kongresanoj. Inter ili kaj la Israelanoj estis tre amikecaj rilatoj.

La plej juna kongresano estis 8-monata svedo, kiu ĉeestis (kun la gepatroj, kompreneble) grandan parton de la programeroj. Mi ĵuras al , ke li aktive partoprenis la prelegojn, inter alie per kriaĉoj, plorsonoj kaj simile.

Kiel kongresejo servis loka lernejo, sufiĉe luksa, Ni dormis sur blovmatracoj en la klasĉambregoj en "grandaj rondoj familiaj" (20 kongresanoj en ĉambro).

Tre bona etoso estis dum la tuta kongresa semajno, precipe dum la vesperoj kaj nokte (malgraŭ la lumo...). Kantado kaj dancado, akordeono kaj gitaro, internacia babilado kaj ludado, banado en la proksima lago kaj trinkado / drinkado en la kafeterio - ĉiuj tiuj kontribuis al la sukceso de tiu - ĉi granda junulara kunveno, aldona al la oficialaj kongresaj programeroj.



UK - Stokholmo

Tuj post la IJK oni ĉipiris al la bela Stokholmo por partopreni la Universalan Kongreson de Esperanto kun ĉeesto de 1807 samideanoj el 50 landoj.

o o o

La UK-on partoprenis 6 Israelanoj. En la solena fermo oni laŭtlegis gratulan telegramon de la Israela registaro, senditan pere de nia ambasadoro en Stokholmo al la Kongreso.

o o o

Kelka ro da gejunuloj, kiuj venis al la kongresejo rekte de Rauma, ne havis antaŭmenditan loĝlokon. Dank' al la gastamo kaj bonkoreco de la esperantistoj, ĉiuj sukcesis fine akiri tranoktejon - ĉu ĉe lokaj samideanoj, ĉu sur planko de la ĉambroj de aliaj junaj kongresanoj en iliaj junulargastejoj.

o o o

La ĝenerala temo de la kongreso estis ĉi jare Diskriminacio. Ĝi estis dividita al kelkaj subtemoj: diskriminacio kontraŭ etnoj kaj rasoj, internacia ekonomia diskriminacio kaj diskriminacio kontraŭ virinoj. Pri ili okazis laŭlonge de la semajno prelegoj, seminarioj kaj diskutgrupoj.

o o o

En Stokholmo oni elektis novan Estraron por Universala Esperanto-Asocio. La nova prezidanto de UEA estas Grégoire Maertens el Belgio.

Tre ekscita momento estis, kiam la tuta kongresanaro ekstaris kaj longtempe aplaudis honore al ĵus anstataŭigita prezidanto, d-ro Humphrey Tonkin, kiel esprimon de atestimo kaj danko pro lia agado por la movado en la lastaj jaroj.

o o o

Delegacio el Pekino, Ĉinio, partoprenis la kongreson. Cetere la ĉinoj prezentis al UEA aliĝpeton kiel Landan Asocion.

o o o

Dum tiu ĉi semajno multaj Stokholmanoj informiĝis pri nia kongreso kaj pri Esperanto ĝenerale. Unue, multaj verdaj flagoj fliris en ĉefaj lokoj en la urbo. Due, plej grave: ĉiu kongresano trovis en la kongresa dosiero kelkajn ekzemplerojn de svedlingva informfolio pri Esperanto, kiun li povis disdoni surstrate, restoracie, ĉe la hotelo ktp. Ŝajnas, ke tiu-ĉi saĝa rimedode propagando estas imitinda en ĉiuj sekvontaj

kongresoj.

o o o

La kongresa balo okazis en la fama "Blua Halo" de la pitoreska urbodomo de la sveda ĉefurbo. En la sama loko oni ĉiujare transdonas la Nobel-premiojn. Samloke okazis ankaŭ la tradicia akcepto, kiun faris la urbestro al parto de la kongresanoj. Ĉi jare la akcepto estis speciale "bon-gusta".

o o o

Jam fariĝis tradicio en UK-oj okazigi kantokoncerton de la bulgara baritono V. Damjanov. En sia ĉi-jara repertuaro inkludis la kantisto la kanton de nia s-ano J. Giladi "Esperanto - la lingvo por ni". La muzikon por tiu-ĉi kanto komponis V.D. mem.

Ĉiutage ni ricevis en la kongresejo la tagan "kongresan kurieron" kun diversaj sciigoj kiuj rilatas la programon k.s. Unu tagon tiu ĉi populara kuriero havis le jenan titolon: 65-a Universala Kongreso de Edzperanto, Stockholm 1890 : Kongresa Kuriero. Temis pri sciigoj, kiel: kunveno de esp. fiŝkaptistoj, kiu devus okazi ĉe la marbordo de la 04-a horo, aŭ: anonco de kongresano, kiu deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun fraŭlino, edziĝocelo...

o o o

Matenmanĝo kun la prezidanto estis unu el la "varoj" ĉe aŭkcio, kiun oni okazigis kadre de la kongreso. Oni vendis tie altvalorajn esp. librojn, historiaĵojn, kiuj rilatas esperanton ktp. Ĉiuj enspezoj eniris la fonduson Azio- Afriko de la Asocio. Parenteze, la supre menciita manĝo kondukis al la feliĉa aĉetanto 80 svedajn kronojn (1040 IL). Sufiĉe apetitiva manĝo!

o o o

Dum la kongresa semajno (la 6-an de aŭg.) okazis en Stokholmo la tradicia "tago de Hiroŝima", dum kiu oni primemorigas la katastrofon de la atombombo en 1945. Multaj esperantistoj partoprenis la grandan vesperan torĉo-manifestacion okazintan precize 35 jarojn post la bombado de la japana urbo.

o o o

La venontan jaron la Kongresoj de Esperanto okazos en Ameriko: La UK okazos en Bazilo kaj la IJK estos en Meksikio.

Ĉu vi jam aliĝis?

Josef Ŝemer



LA LANCO KAJ LA KUDRILLO

Julius Hecht (laŭ la fablo de Eliezer Steinberg)

Soldato ajna, eble eĉ bravulo
Revenis hejmen post militklopodo
Kun lanco kaj pafilo
Kaj ilin en angulo
Apogis al komodo
Sur kiu trovis sin kudrilo.

"Ho, kia kudrilego! (pensas la kudrilo mire
Gapante al ĉi-lanc' senspire)
Ĝi certe kudras vestojn specialajn,
Sendube ladajn aŭ eĉ ŝtalajn
Kaj per rapidaj pikoĵ dikaj,
kvalitefikaj
Videble por Goljato egfigura
Aŭ por giganto pli terura".-

Sed nia lanc'? Ĝi la kudrilon primezuras:
Jen pita lancinfano!
(Finfine ĝi murmuris)
-Jen minca nano!
Kaj kia malfortika
Estaĵ' komika!
Kiele do ne iom moki?
Kaj ŝerde ĝin ne ekprovoki:
Sen hont' konfesu, frato,
Ĉu veras la terura famo
ke vi, vi estas pura flamo
Kaj kiam io vin intrigas
Per unusola pinta bato
Sep muŝojn vi eĉ pikmortigas?-


"Mensogo!" La kudril' protestas time
Kaj puranime.
"Mi ĵuras eĉ per la altaro!
Nur tolon kudre mi trapikas,
Material' ĝi estas, tia varo.
La homoj ĝin fabrikas".-

-Ĥa, Ĥa, ektondras lanca rido
Ĥa, Ĥa! trapikas tolon ĉi vermido!-
"Sed kial ridi?
Ĉu malfacilas vidi
(Hezite la kudrilo diras)
Ke mi
Trapiki ladon ja ne provus.

Samkiel vi
kaj eĉ ne provus."

-AĤ, haltu! Plu mi ne eltenas,
Mi sentas ke pro rid' mi svenas
Aŭ ekpaftiras.-


-"Pardonu!" (la kudrilo kuraĝetas)
"Vi ne ĉagrenu, mi vin petas.
Sed diru nur sincere,



Krom tolon, ladon aŭ eĉ ŝtalon
Nu kian do materialon
trapiki eblas vere?-"

-Nu homojn, homojn oni pikas!
(La lanc' respondis bonhumore)
Kaj nun ekridis la kudrilo laŭte kaj elkore
Kaj fine ĝi replikas:

"Trapiku tolon pinte, sperte
Veston aŭ ĉemizon vi elfaros,
Sed piku homojn eĉ plej lerte
El ili kion vi preparos?-"



B R A Z I L I O - recepto kiel krei ĉefurbon

Brasília (esperante: Bazilio), ĉefurbo de Brazilo, sin preparas por
gastigi en julio 1981, dum la sudamerika vintro, la multajn esperantist-
ojn, kiuj venos tien por ĉeesti la 66-an Universalan Kongreson de Esper-
anto.

Ĉi foje oni kongresos en speciale interesa urbo, en urbo, kiu en
aprilo 1980-a fetis sian (ĥur!) 20-jaran datrevenon de fondiĝtago.

Situanta en Centra Altebenaĵo de la lando, la nova ĉefurbo de Bra-
zilo ekrealigis, en 1960, la centjaran sonĝon de pluraj homoj kaj ektrans-
formiĝis en realaĵon por multaj aliaj, kiuj senĉese ĝin taksadis kiel ab-
surdan teorion dum jaroj kaj jaroj. Jam de la 18-a jarcento oni sugestis
en Brazilo la translokigon de la ĉefurbo al la regiono de Goiás, kie fin-
e estis konstruita en la 50-aj jaroj de la nuna jarcento la urbo Brasí-
lia.

Por fari novan modernan urbon sen obstakloj jam konataj en aliaj
metropoloj en la tuta mondo, la tiama brazila registaro multon postu-
lis. Ne malpli ol 26 projektoj estis prezentitaj al la speciala Kompanio
de la Nova Ĉefurbo, kiu kreiĝis en la jaro 1956. Tiuj ĉi projektoj kon-
kurencis en la publika konkurso, kiu devus elekti la planon de la nova ur-
bo, kiel eble plej avantaĝa kaj utila. La venkinto en tiu konkurso estis
la arkitekto Lúcio Costa, kies plano estis aprobita de la postulema juĝan-
taro. Oni trovis ĝin simpla kaj kapabla doni al la nova ĉefurbo la funkci-
econ kaj sintezon arkitekturan vere akordan kun la filozofio postulata por
la konstruota urbo.

Prof. L. Costa desegnis la "plano Piloto"-n, nome la ĉefan planon, --
kies formo similas al aviadilo alteriĝanta sur vasta verda areo. Li ella-

boris projekton, kie la komunumoj estis dividitaj en specifajn sektorojn, en kiuj estu certigita la privateco de la civitanoj; kaj tiu divido devus esti konforma al la aparta disigo de areoj destinitaj al sportaj, kulturaj kaj industriaj agadoj. En sintezo, la modela urbo povus evolui laŭ siaj plenaj kaj absolutaj urbaj kondiĉoj, sen la sufoko kaj interpremo ekzistantaj en la grandmetropoloj de la mondo. La urbanismo de Lácio Costa kaj la arkitekturo de Oscar Niemeyer ekrevoluciis la mondon ekde 1962.

Por kelkaj politikistoj de la opozicio, la translokiĝo de la ĉefurbo al Brazilio signifis aventuran kaj senpripensan agadon. Ili antaŭvidis finanĉan katastrofon al la lando kaŭze de la translokigo. Tiu versaĵo ne estis la plej malfacila obstaklo, kiun la nova urbo devis superi: pasinte la incidentojn kaj la politikajn disputojn la urbo komencis fizike aperi. Miloj da familioj forlasis siajn urbojn, survoje al tiu nova Eldorado, kiu estis konstruata en geografia centro de Brazilo. Kun tiuj homoj venis novaj kutimoj kaj tradicioj. La urbo konstruiĝis dum tagoj kaj noktoj. Poste alvenis ĉiuj publikaj kaj ŝtataj oficejoj el la ĝisnuna ĉefurbo, Rio de Janeiro. Sekvis ilin la diplomataj reprezentantoj, kiuj internaciigis la urbon. Komence de la okdekaj jaroj, la brazilia ĉefurbo povas fieri pro sia transformiĝo en la plej junan kaj sendependan ĉefurbon de la mondo. La urbo, ekz., estas preskaŭ memsufiĉa pri sia provizado agrikultura.

Laŭ antaŭvido de la urbanisto Costa, "Plano Piloto" de Brazilio estus ĉirkaŭita de tranoktaj kvartaloj, poste nomitaj satelitaj urboj. Oni intencis finkonstrui kaj plifirmigi ilin kiam "Plano Piloto" de la ĉefurbo estus entute okupita. Tamen, la evoluo de tiuj satelitoj pli kaj pli rapidiĝis, kio mirigis la planistojn. La enmigra flugo kaj la sociaj problemoj naskitaj de tro da homoj serĉantaj profitdonan laboron, kaŭzis la anticipon de la finkonstruado de pluraj satelitaj urboj, dense enloĝatajn, ĉiu de ili havanta sian propran vivon.

Jen la "recepto" kiel krei ĉefurbon. Nature, recepton sekvas "apetito": kongresi unuafoje en la historio de la Esp.- movado en la sudamerika kontinento kaj "gustumi" la unikecon de tiu ĉi mirakla brazila ĉefurbo.

laŭ Jornal dos Congressos
e Turismo.

ESPERANTO NEPRE VENKOS

La verdan standardon tre alte ni tenos
Ĝi signas la bonon kaj belon.
La Forto mistera de 1^a mondo nin benos
Kaj nian atingos ni celon.

D-ro L.L. Zamenhof

Jen etendiĝas antaŭ ni,
en subĉiela sfero,
revita nia Arkadi'
kaj promesita tero.

Ne ĉiuj ni eniros vin,
patruj' de bono, vero;
Sed ni hodiaŭ vidas ĝin,
la landon de 1^a Espero.

Antoni Grabowski

Se la sufer' multvizaĝe grimacas,
la malespero vin kapti ne minacas,
estu en stato atenda, ne cedu,
certe troviĝos eliro, nur kreu!

Hilda Dresen

Alvokas nin 1^a epoko -
al agoj vokas nin,
je ĝia forta voko
batalas ni sen tim'.

G. Ĉagarov.

Antaŭen do kun pluma ardo,
Samideanoj al batal'
Jam flirtas alte verd' standardo,
Ĝin benas nia ideal'.

Esperon nian realigos ni, amikoj,
Se ni laboros same, kiel la formikoj.
Persiste, sindonema kaj kun optimismo,
Efekte, por triumf' de la esperantismo.

S. M. Simeonov



IO PRI "ĤASIDOJ" KAJ TIES KONTRAŬULOJ

La "ĥasidismo", - la aparta religi-ideologia movado en kadro de judismo, fondita en orienta Eŭropo dum la 30-aj jaroj de XVIII-a jc., akiris multajn adeptojn. Post la morto de la fondintoj, ĝi disfalis je diversaj ideologiaj tendencoj, ek de ekstrem-mistikaj ĝis la racionalistaj.

Ĉiu direkto havis sian ĉefon, - idon de unu el la fondintoj. Tiu portis la titolon "cadik" (=justulo) kaj li laŭ la kredo de siaj adeptoj heredis la sanktecon de sia praulo kune kun ties mirakla potenco, precipe rilate al la benforto, kiu nepre estas realigpova. Ĉiu "cadik", aŭ "rabbi", elektis alian urbeton kiel sian rezidejon.

La "ĥasidoj", - adeptoj de tiu aŭ alia "rabbi", kutimis almenaŭ unu fojon dum jaro, precipe dum festotagoj, vizitadi sian rabenon, cele partopreni ties tagmanĝan ceremonion, kunkantadi kun ĉiuj la specifajn kantojn de sia rabbi, aŭskulti ties predikon kaj akcepti la benon de la justulo kaj prezenti al li mondonacon. Estas atentinde, ke ĉiu "domo" de la "cadik" posedis siajn apartajn melodiojn hereditajn. Ĉar la ĥasidismo predikis optimismon, la vizito de "rabbi" estis ĝojkazintaĵo.

La ortodoksa judismo neis la ideologian bazon de "ĥasidismo" kaj traktis mokeme ĉiujn ritojn, kiujn la ĥasidoj enkondukis. Precipe la adoradon de personeco kaj kredon je la miraklofara beno. La adorvizitadon de rabbi, la ortodoksa judismo priopiniis vanta fantaziaĵo. Tial en ĝia sino kreiĝis multaj kantoj, en kiuj estis primokataj la ĥasidoj, iliaj rabenoj kaj moroj.

Unu tia kanto mokeme pritraktas tipon de ĥasido-hipokritulo, kiu bigoteme afektante piecon, ne evitas pekeman rilaton al bela virino.

Tian kanton mi deziras prezenti al la esperantista leganto, en iomete libera traduko. Kredante, ke ĝi povas bone priservi niajn klubajn kunvenojn. La liberecon de la traduko alkondiĉigas la neeble transdoni la specifajn nociojn, kiuj tradicie ricevis apartan sencon. Ekzemple en la originalo estas dirite pri la ĥasido, ke "li foriris siavoje, kiel hundo dum la naŭ tagoj". La esprimo aludas je la unuaj naŭ tagoj de la malgaja monato Av, dum kiuj la judoj (de la antaŭa generacio) kutimis ne manĝi viandon. Tial hundo en juda hejmo tiam estis eldevigita malsati...

Rilate al la melodio, gajkarakterata ĉar mokintenca, mi rimarku pri la

nepre gardo de la sono si-bemola en la dua takto. Ĉar la kanto estas konstruita laŭ la t.n. "miksolida" skalo, karakterata por judaj antikvaj melodioj.

AL RABEN' PIUL' RAPIDAS

AL RA-BEN' PI-UL' RAPI-DAS. LA ĈEVA-LOJN LI NE BRIDAS. PRI VE-TUR' A-PERAS DU BO. ĈAR SUBI-TE PLORAS

NU BO. LAŬTE SONU KANTO - TO, KUN ĜOJ-plena ri-pe-to.

POPOLKANTO pri ĥasido-piulo (jid-lingva)

(Post ĉiu kvarlinia strofo, per solulo kantinda, sekvas porĥora refreno:

"Laŭte sonu kanteto
kun ĝojplena ripeto!")

Al raben' piul' rapidas
la ĉevalojn li ne bridas.
Pri l' vetur' aperas dubo,
ĉar subite ploras nubo.

Tra nebul', - jen silueto
videbliĝas, de dometo.
Ĝojas li pri vid' hotela
kun mastrino juna, bela.

- "Hej, mastrino, belulino,
kie estas via vino?"
Li ricevas la regalojn,
multajn trinkas li, pokalojn.

Rondturniĝas lia kapo
pro la vin' kaj viringapo.
- "Mia plaĉa belulino,
prenu tukon el muslino!

Sed permesu la altuŝon
per la kis' sur vian buŝon!"
La mastrin' la tukon prenas,
diras: - "Kisi ne konvenas!"

- "Hej, mastrin', jen ring' orela,
donu kison al mi, bela!"
Orelringoj al ŝi plaĉas,
kisi sed, oldulon aĉas!

14.

- "Prenu broĉon kaj plezuru,
donu kison, ne forkuru!"
Kison la mastrin' promesas,
sed plenumi ŝi forgesas.

- "Mia ĉarma dommastrino
kial tia mor-obstino?
Estas vi tre prudemeca,
tio ĉi ne estas deca.

Nun mastrino, min pardonu,
la donacojn tuj redonu!
Kaj estimu la regulon:
ne moktrompu la piulon!"

Kaj foriris sen rezulto
la piulo, kun insulto;
vane kiel hunda vago
ĉar malsata pro fast-tago...

Laŭte sonu kanteto
kun ĝojplena ripeto!



KELKAJ INFORMOJ PRI LA NOVA KONGRESLANDO

Venontjare (1981) la Universala Kongreso de Esperanto okazos en Brazilo. Brazilo, situanta en Suda Ameriko, okupas 48% de ĝia supraĵo kaj estas la kvina en la mondo laŭ la grandeco. Superas ĝin nur Sovetunio, Ĉinio, Kanado kaj Usono. Ĝia supraĵo okupas 8.513.844 kvadratajn kilometrojn kaj estas pli granda ol tuta Eŭropo sen Ruslando (eŭropa parto). Ĝi estas 4320 km longa kaj larĝa. La plej granda urbo estas São Paulo; ĝi havas 8 milionojn da loĝantoj inkluzive antaŭurbojn. Ĝi estas la ĉefa industria urbo. 350 km oriente de ĝi estas preskaŭ same granda urbo: Rio de Janeiro; ĝi havas iomete malpli ol 8 milionoj da loĝantoj. Rio de Janeiro apartenas al la plej belaj urboj en la mondo. Ĝiaj partoj kaj satelitaj urboj situas sur la deklivoj de la krutaj montoj kaj ĉe la oceana golfo. La kombino de la montaro, moderna urbo kaj atlantika golfo kreas neimageblan belan pejzaĝon. Konataj estas en la mondo du altaj krutaj montoj situantaj meze de la urbo. Iliaj nomoj estas: Pão de Açúcar (Sukera Kapo), 395 m. super la mara nivelo kaj Corcovado, 704 m s.m.n. Ambaŭ estas atingeblaj per kablovagono. Sur la pinto de la dua staras grandioza statuo de Jesuo Kristo. La pejzaĝo de ambaŭ montoj estas vidinda.

La UK okazos tamen en urbo Brazilio, situanta 800 km norde de tiuj urboj. Ĝi estas 10-oble pli malgranda (800 mil da loĝantoj). Ĝi estas atingebla per vagonaro, aŭtobusoj kaj aviadiloj. La priskribo de Brazilio estas en alia loko en tiu numero de I.E.

La UK estos en aŭgusto. Ĝi estas en la suda Ameriko mezo de la vintro kaj povas okazi, ke estos tiam seriozaj pluvoj, sed oni ne devas atendi malvarmon, ĉar la urbo Brazilio situas en tropika regiono.

En Brazilo vivas 130 milionoj da homoj. Ili parolas portugalan lingvon kaj nur malmultaj konas aliajn tiel nomatajn "mondajn" lingvojn. Ne atendu do, ke ili komprenos anglan kaj francan lingvon krom la personalo de luksaj hoteloj. 62% de la loĝantoj estas de eŭropa deveno, 11% estas nigruloj, unu % indianoj kaj restaĵo mestizoj. La ĉefa religio estas la katolika, la homoj en sia plimulto estas piaj. Estas do multaj preĝejoj vizitataj dum dimanĉoj de amaso da homoj.

La Esperanto-movado en Brazilo estas tre vigla. Esperantajn kunvenojn en la grandaj urboj vizitas ofte kelkcent homoj, sed la lando ne havas unu organizaĵon sed kelkajn, kiuj ne ĉiam kunlaboras.

En la norda parto de Brazilo fluas la plej granda rivero Amazono. Ĝi komenciĝas en la montoj Andoj en Peru kaj estas navigebla en la tuta Brazila parto (6000 km) por la oceanaj ŝipoj. La distanco de la grandaj urboj ĝis Amazono estas 2700 km kaj ĝi estas atingebla nur per aviadiloj kaj ŝipoj.

En Brazilo loĝas 150 miloj da Judoj, de ili duono en São Paulo.

Kuranta mono estas kruzejro, kies kurzo rapide ŝanĝiĝas pro la alta inflacio.

Estu bonvenaj en la venonta UK en Brazilio.

H. MAŠler



R E C E N Z O

Skizoj, de Peter Altenberg
En esperanta traduko de Grete Breunlien.
Eldonejo: Aŭstria Esperanto-Instituto, Wien 1980.

Peter Altenberg (1859-1919) estas pseŭdonimo de Richard Engländer, naskita al juda-germana familio en Vieno. Lia patro estis komercisto. Li finis la jursciencan kaj medicinan studojn. Distingiĝinte per siaj mallongaj rakontoj en kiuj li priskribis la vivon en Vieno dum la fino de la 19-a jarcento kaj la epokon antaŭ la unua mondmilito, li estis majstro en verkado de mallongaj skizoj. Liaj rakontoj estas esencaj, talente konstruitaj, enhavoriĉaj kaj bazitaj je homaj travivaĵoj. Liaj mallongaj rakontoj altiras la atenton de la leganto per siaj brileco kaj homa prudenteco. Tiel ekzemple - kiam li mencias la vivon de Beethoven, li substrekas, ke en la vivo de geniulo ĉio devas interesi nin: kiel marŝis Beethoven, kiamaniere li kondukis, kiel li akceptis aŭ malakceptis gastojn, kiam sapon li uzis ktp. Ĉar la geniulo estas kompleta organismo, ĉiu plej malgranda radeto, valveto, apartenas al genia maŝinaro!" oni ne povas fari diferencon la homa organismo inter gravaj kaj negravaj membroj, ĉio estas grava en tiu ĉi komplikita giganta maŝinaro, ĉar ĝi povas funkcii normale nur kiel tuteco.

Sed la homoj ne kondukas tiel. Ili ne rigardas la vivon, kiel unu harmonian tutecon, sed vidas ĉion kiel apartajn fenomenojn aŭ eventojn.

Peter Altenberg priskribas en siaj koncizaj rakontoj kiel homoj pensas nur per la etaj travivaĵoj: ili ĉiam memorigas siajn "ŝtonecan pekovivon" por puni sin mem pro sia "tro malmulta homeco", kiel stulte ili vivas kaj pensas ĝenerale pri sia "mallonga ekzisto".

Pro tio la homoj ne dormas bone kaj estas malfeliĉaj. Altenberg substrekas en siaj rakontoj la bagatelecon de la homa konduto, pro kio "ne pasas ilia nokto."

La rakontoj de Altenberg ne nur respegulas sian tempon kaj ne nur ĝojigas la legantojn ankaŭ nun, sed edifas kaj instruas. Pro tio ilia aktualeco neniam forpasas kaj neniam forpasos.

Aleksander Manor

Fruktoj de suspektado

Izraelaj edzinoj abomenas nenion pli ol siajn mastrumajn devojn — pro la varmega klimato, pro la penado kaj ĝenerale. Eĉ patrinoj preferas transpreni malbone pagatajn laborozajn postenojn kaj per ŝvite gajnita salajreto mem dungi mastrumantaron, sole por ne mem esti okupata per sia propra mastrumado. Sendube estus pli bone, se po du virinoj kontraktus unu kun la alia, reciproke zorgi pri la mastrumado de la alia. Sed ĉar tia solvo estus logika, neniu mastrumantino ĝin eltrovis ĝis nun.

Malsamopinioj ekestas ne nur inter patroj kaj filoj, sed ankaŭ inter patroj mem. De tempo al tempo en Izraelio estiĝantaj rasaj antaŭjuĝoj pro tio estas ne tute eviteblaj. Ekzemple la spirite primitivaj kaj morale senvaloraj enmigrintoj el Eŭropo asertas, ke la malhel-haŭtaj judoj estus morale senvaloraj. Min persone tia rasa trofiero nur unufoje venkis. Memorante tiun spiritan elreliĝon mi ankoraŭ hodiaŭ hontruĝigas.

Antaŭ kelka tempo mia edzino informis min, ke ŝi ne plu sola sukcesus plenumi siajn mastrumajn devojn. Ĉio estus tro multa, de kiam ni nun ankoraŭ havus kanarian birdon. Kaj pro tio ni tuj bezonus fortan kaj laboreman helpantaron.

Post longa serĉado kaj tre zorga ekzamenado ni finfine decidiĝis favore al Mazal, ina estajo, kiu en nia kvar-talo havis plej bonan reputacion. Mazal estis orientanino mezaĝa kaj inteligent-aspekta, ĉar sur ŝia nazo troviĝis senrandaj okulvitroj, kiujn ŝi helpe de du dratoj balanciĝis sur la pinto de ŝia nazo.

Estis fakte amo je la unua ekvido. Mi tuj ekkonis, ke ĝuste Mazal taŭgus helpi mian vere trookupitan edzinon. Kaj ĉio funkciis glate, ĝis — subite nia najbarino, sinjorino Savua Tov, gutiĝis la amaran oleon de l' suspekto en niajn nur tro aŭskultemajn orelojn.

"Vi, naivuloj", ekpredikis sinjorino Savua Tov, kiam ŝi ĉiutage vizitante nin ekvidis nian helpantaron diligente balai. "Se tia fivirinnaĉo kia Mazal laboras ĉe vi, ŝi ja certe ne faras tion sole pro la avere pagata salajro, kiun ŝi ricevas de vi."

"Pro kio ŝi do alie farus tion?"

"Por ŝteli", sinjorino Savua Tov re-diris.

Ni emfaze rifuzis tiun kalumnion. Neniam, ni emfaze deklaris, Mazal farus ion tian, neniam.

Sed post kelka tempo mia edzino rimarkis, ke Mazal balaante la plankon ne rigardis en niajn okulojn. Iel ŝia konduto pensigis nin pri tiu de Raskolnikov en la konata verko de Dostojevski. Krom tio la poŝoj de ŝia labor-kitelo estis eksterordinare grandaj.

Per mia karakteriza ruĝo mi komencis observi ŝin, ĉe kio mi ŝajnis studi la gazeton ĝis la lasta punkto. Tiukaze mi perceptis, ke Mazal puriĝis niajn arĝentajojn per strange, preskaŭ timige avida ĝojo. Ankaŭ aliaj suspektindaj ektrapis nian atenton. La atmosfero pli kaj pli kaj pli streĝiĝis kaj fine fariĝis tiom netolerebla, ke mi proponis informi la policon.

Sed mia edzino, bonege informita legantino de l' tutmonda kriminala literaturo, tuj atentigis min, ke la ĝis nun kontraŭ Mazal kolektita materialo estus ne pli ol kelkaj malmultaj indicoj senpene refuteblaj. Tial ni eble devus unue peti konsilon de nia jam menciita najbarino.

"Vi devus kapti tiun monstron dum la krimo", sinjorino Savua Tov klarigis al ni. "Vi povus ekzemple ie kaŝi monbileton. Kaj se Mazal trovinte ĝin ne redonus ĝin al vi, vi transportus ŝin antaŭ la juĝiston!"

Unu tagon poste ni konstruis la kaptilon. Ĉe tio ni decidiĝis favore al kvinpunda monbileto, kiun ni metis sub la banĉambran maton.

Jam de l' frua mateno mi estis tiom nervoza, ke mi fakte ne kapablis labori. Ankaŭ mia edzino plendis pri pikaj kap-doloroj. Tamen ni sukcesis, detale fiksi nian operaci-planon. Mia edzino devus deturni la atenton de la dumkrime trafitan monstron per ĉiaj eblaj erarigaj manovroj, dum mi telefone alarmus la policon.

"Ŝalom", Mazal salute eniris en la ĉambron, "en la banĉambro mi trovis sub la mato dek pundojn."

Ni devis kaŝi nian senluziĝon post murmurado kaj retiriĝis estante konsternitaj. Dum kelkaj minutoj ni ne kapablis rigardi unu la alian. Poste mia edzino diris:

"Kio koncernas min, mi ĉiam plene konfidis al Mazal. Mi neniam komprenis, kiel vi povis pensi, ke tiu ĉi sincera kaj verama servistino povus ŝteli iom de ŝia mastro."

"Ĉu do mi asertis, ke ŝi ŝtelus? Ĉu mi?" Mia voĉo renversiĝis pro certe bon-motivita kolero. "Estas impertinente, aserti tion pri mi! Dum la pasintaj tagoj mi senĉese penis projektiti ĉi-tiun modelon de virtoza per-

sono kontraŭ viaj abomenindaj spektotoj!"

"Ha, ne devigu min al ridado", mia edzino ekridante respondis. "Vi estas komika homo."

"Kion vi diras? Ĉu mi estu komika? Ĉu vi eble bonvolus informi min, kiu el ni do metis la dekpuandan monbileton sub la maton, kvankam ni tien volis meti nur kvinpuandan? Se ekzemple Mazal — ion similan ŝi certe ne kapablus fari — fakte estus ŝtelinta la monon, ni estus tute eviteble pli malriĉaj je dek pundoj."

Ĝis la vespero ni ne plu parolis unu kun la alia.

Kiam Mazal finis sian laboron, ŝi venis al ni en la ĉambron por adiaŭi. "Bonan nokton, Mazal", diris mia edzino per akcentita ĝentileco. "Ĝis revido morgaŭ matene. Kaj bonvolu veni akurate."

"Jes", la brava hejm-servistino respondis. "Certe. Ĉu madamo ankoraŭ volis doni ion al mi?"

Post tio vere ekestis la plej laŭta bruego de post la pasintaj dumil jaroj.

"Madamo do ne inklinas doni al mi, ĉu?" Mazal kriavoĉe elbuŝigis. Ŝiaj

okuloj brilegis. "Kaj kio pri mia mono, he? Vi ja mem tre bone scias, ke vi metis nur kvinpuandan monbileton sub la maton, por ke mi ĝin ŝtelu! Ha, vi superinteligentuloj volis elmeti min al provo, ĉu ne?"

La vizaĝo de mia edzino alikoloriĝis. Mi mem esperis, ke la planko en la ĉambro malfermiĝu por engluti min, sed bedaŭrinde sensukcese.

"Hel! Pro kio vi ankoraŭ atendas?" Mazal senpacience elbuŝigis. "Ĉu vi eble intencis reteni mian monon?"

"Bonvolu pardoni, kara Mazal", mi embarase ridetante redonis. "Jen estas viaj kvin pundoj, kara Mazal."

Mazal bruske ŝiris la monbileton el mia mano kaj malaperigis ĝin en unu el siaj eksterordinare grandaj kitelo-poŝoj.

"Kompreneble", ŝi diris senpasie, "mi ne plu povas labori en domo, kie oni kutimas ŝteli. Feliĉe mi konstatis tion ankoraŭ sufiĉe frue. Nuntempe oni ne rajtas fidi ĉiujn homojn..."

Ŝi foriris. Kaj ni neniam revidis ŝin.

Sed sinjorino SavugTov diskonigis inter ĉiuj niaj najbaroj, ke ni vane provis prirabi malriĉan, honestan domo-helpantinon.

Tradukis Gerhard Ziegler

TEJO seminariis en Eŭropa Junulara Centro

En junio (15-22) okazis en Strasburgo (Francio) seminario de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), kun la temo "Internacia komunikado - aplikado de Esperanto".

La seminarion partoprenis 32 aktivuloj de TEJO el 12 eŭropaj ŝtatoj kaj unu el Israelo (Amri Vandel).

Tio tamen ne estis ordinara seminario de TEJO. Organizis kaj subvencis ĝin la Eŭropa Junulara Centro, grava kaj moderna konferenco - centro ligita al la Eŭropa Junularo - Federacio kaj al la Eŭropa Konsilo. TEJO nis sin al la centro kun propono organizi seminarion pri tiu temo kaj la propono estis akceptita. Tiel TEJO aliĝis al la respektinda listo de gravaj internaciaj junularaj organizoj (kiel la skolta movado), kiuj okazigas seminariojn en la strasburga centro.

Tio estas grava okazo por TEJO prezentiĝi kiel serioza internacia organizo kaj prezenti Esperanton sur respektata internacia podio.

A. V.

ANTAŬ KONGRES'

1. Atendas min belega tago
Atendas min la stel', la flago
Atendas min kunsid' estrara
Kaj Esperanto senerara.
2. Atendas min amik' kroata
Kaj veturado surboata
Atendas min hungarlingvano
Kaj matenmanĝe blanka pano.
3. Atendas min' etos'amika
kun franclingvano iom dika
Atendas min iu germano
Kun tas' da kaf' en sia mano.
4. Atendas min iu bulgaro
Kun iu taŭza kaphararo
Atendas tie min italo
Kun verda stel' el pura ŝtalo.
5. Atendas min la prezidanto
Kune kun la kotizperanto
Kaj la estraro sen escept'
Laŭ novstatuta ĉefkoncept'.



David Mager

PRAKTIKA VORTARO POR ĈIUTAGO

ampolo	נורה חשמל	blato	מקק ("יוק")
ciro	מישחח נעלים	ĝano	הדק (בבלי יריה)
diapozitivaj	שקופיות	ekipaĵo	ציווד
feno	מייבש שיער	golo	שער (בדורגל)
ĝiri	לפנות (בנסיעה) ימינה או שמאלה	indico	מדד (אינדקס)
hupi	לצפור (במכונית)	jetono	אסימון
juvelo	חכשיט	laktuko	חסה
krano	ברז	nudelo	איטריה
maĉ/gumo	גומי לעיסה	plotono	מחלקת חיילים
oscedi	לפהק	suĉumo	מצץ (של תינוקות)
rukti	לגהק	trapiko	נקר בצמיג ("פנצ'ר")
ŝalmo	קשית (לשחיה)	veŝto	מתניה ("רוסטה")
ulcero	כיב (אולקוס)		
zipo	רוכסן ("ריצ'רץ")		

NIAJ KONGRESOJ en la israelaj radio kaj gazetaro

1. La 2-an de julio - en la tago de la inaŭguro de la Universala Kongreso en Stockholm , Kol Israel (Israela Radio) sciigis pri la Kongreso en sia novaĵbulteno vespere je la 19.00.
2. La grava ĵurnalo Maariv informis pri la UK kaj pri la lingvo Esperanto la saman semajnon.
3. Post la reveno de la UK kaj IJK, s-ano J. Šemer estis intervjuita por la radiostacio Galej Cahal (Ondoj de la armeo). La intervjuo temis plejparte pri la partopreno de la Israelaj s-anoj en ambaŭ universalaj okazaĵoj.

KURSOJ DE LA INTERNACIA LINGVO

1. En junio finiĝis sukcese la dua kurso de Esperanto en la politekniko Tefnion, Ĥajfo. La unusemestran kurson gvidis Anat Zajdman. Du de la finintoj tuj post la fino de kurso partoprenis la Internacian Junularan Kongreson en Rauma , Finnlando.
2. La tradiciaj kursoj de Esperanto, kiujn gvidas senĉese d-ro H. Mašler en la Junulara Centro, Tel Aviv, ekde la jaro 1966, okazos ankaŭ ĉi jare. La proksima kurso komenciĝos la 15-an de oktobro, je la 5-a horo vespere. Bonvole informu kaj varbu novajn kandidatojn. Detalojn oni povas ricevi per telefono 03-240 459. Se la nombro da lernantoj estos sufiĉe granda, estos du kursoj. La duan kurson gvidos s-ano J. Murĵan. Afiŝoj kaj cirkulerojn pri la kurso oni povas ricevi en la klubejo Ĵaŭde je la 7. vesp. ĉe d-ro Mašler.

JARKOTIZO por ELI / ABONTARIFO por IE

Israelaj legantoj, kiuj ankoraŭ ne pagis la jarkotizon por membreco de ELI (180 IL au 18 IS, inkluzive abontarifon) estas petataj plenumi sian samideanan devon.

Kromaj monkontribuoj estos ricevitaj granddanke.

Abontarifo por eksterlandaj legantoj: 10 internaciaj respondkuponoj aŭ egalvaloro.

NI DANKAS

ELI esprimas koran dankon al s-ano A V R A H A M J A N O V E R pro la donaco de 500 IL por nia biblioteko.